

# IRANA ESPERANTISTO

IREA  
Irana Esperanto-Asocio

N-ro: 44, Dua Serio, Vintro 2023

Kultura sezon-revuo en Esperanto, la persa, la araba kaj la kurda

# سپڙاندیشان

پایم

فصلنامه‌ی فرهنگی چندزبانه اسپرانتو، فارسی، کردی و عربی

شماره ۴۴، دوره دوم، زمستان ۱۴۰۱



نشست‌های اسپرانتودانان:

بازگشت به دوران پیش از کرونا؟!!



JE LA NOMO DE POSEDANTO DE ANIMO KAJ PRUDENTO

# IRANA ESPERANTISTO

Pajam-e Sabzandiŝan  
(Mesaĝo de Verd-ideanoj)  
ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO  
Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia  
Dua serio, N-ro 44, Vintro 2023

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuajoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa, la kurda, aŭ la araba.

\*\*\*

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciui pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu ciferecan kopion al ni: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir).

به نام خداوند جان و خرد

# سبزاندیشان

فصلنامه‌ی پژوهشی - فرهنگی چندزبانه‌ی اسپرانتو، فارسی، کردی و عربی

دوره دوم، شماره چهل و چهارم، زمستان ۱۴۰۱  
شماره استاندارد بین‌المللی (ISSN):  
۱۷۲۸-۶۱۷۴

تاریخ انتشار نخستین شماره: پاییز ۱۳۸۱

نقل مطالب مجله با ذکر منبع و ماخذ جایز است و از استفاده کنندگان درخواست می‌شود یک نسخه الکترونیکی یا تصویر از نشریه‌ی را که در آن مطلبی به نقل از این مجله درج شده است به نشانی اینترنتی مجله ارسال کنند.

مسئولیت مطالب مندرج در این مجله برعهده‌ی نویسندگان آن می‌باشد.

گرافیک و حروفچینی: سبزاندیشان

نشانی‌ها:

پایگاه اینترنتی: [www.espero.ir](http://www.espero.ir)  
پست الکترونیک: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)

## همکاران تحریریه این شماره:

- \* زهرا کریمی
- \* شلر کریمی
- \* کیهان صیادپور
- \* حمزه شفیعی
- \* صلاح محمدپور
- \* علی مرادی

## Mallongigoj uzitaj en ĉi tiu numero

ILEK: Irana Literatura Esperanto Konkurso  
IrEA: Irana Esperanto-Asocio  
IrEJO: Irana Esperantista Junulara Organizo  
IrEK: Irana Esperanto-Kongreso  
IrLEI: Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj  
UK: Universala Kongreso  
AOK: Azia Oceania Kongreso

Irana Esperantisto  
akceptas anoncojn.

مجله سبزاندیشان آماده پذیرش آگهی می‌باشد.

## Kontribuantoj ĉi-numere:

- \* Zahra Karimi
- \* Shler Karimi
- \* Keyhan Sayadpour
- \* Hamzeh Shafiee
- \* Slah Mohammadpour
- \* Ali Moradi



نشست‌های اسپرانتودانان:

بازگشت به دوران پیش از کرونا!

**Kovrila Paĝo:**  
Kunveno en IrEA-Oficejo kun s-ro Reza Kheirkhah  
**Lasta Paĝo:**  
La Kongresejo de IrEK-10

**طرح روی جلد:**  
نشست صمیمانه با رضا خیرخواه در دفتر انجمن  
**طرح پشت جلد:**  
محل برگزاری دهمین کنگره اسپرانتوی ایران



**IrEK-10**  
Civita kaj Virtuala  
27-30 Aprilo 2023  
La Kongresejo

# En ĉi tiu numero:

در این شماره:

- 4 Antaŭ ĉio..
- 4 IrEK-10 alproksimiĝas
- 5 Novaĵoj
- 6 Vojaĝo de Reza al Babolsar  
Raportis: Zahra Karimi
- 8 Ĉu Zamenhof mortis? ...  
Prelego de: Renato Corsetti
- 11 UK-2024 en Afriko  
Gazetaraj Komunikoj de UEA
- 12 Intervjuo kun s-ino Sagafian  
Tradukis: Hamzeh Shafiee
- 20 Oftaj sekaj periodoj...  
Ali Moradi
- 22 Internacia Virina Tago  
Gazetaraj Komunikoj de UEA
- 23 Interkultura Novelo-Konkurso
- 24 Internacia Tago de Edukado  
Gazetaraj Komunikoj de UEA
- 25 Internacia Tago de la Gepatra Lingvo  
Gazetaraj Komunikoj de UEA
- 26 Paĝoj en la Kurda Lingvo  
Shler Karimi
- 28 Paĝoj en la Araba Lingvo  
D-ro Keyhan Sayadpour



- 4 قبل از هر چیز ...
- 4 درباره همایش دهم
- 5 اخبار
- 6 سفر رضاخیرخواه به بابلسر  
ژهرا کریمی
- 8 آیا زامنهوف مرده است؟ ...  
رناتو کورستی
- 11 کنگره جهانی ۲۰۲۴ در آفریقا  
سازمان جهانی اسپرانتو
- 12 مصاحبه با خانم ثقفیان  
ترجمه: حمزه شافیعی
- 20 دوره‌های خشکسالی ...  
علی مرادی
- 22 بیانیه uea به مناسبت روز جهانی زن  
سازمان جهانی اسپرانتو
- 23 مسابقه رمان بین‌فرهنگی
- 24 به مناسبت روز جهانی آموزش  
بیانیه مطبوعاتی سازمان جهانی اسپرانتو
- 25 به مناسبت روز جهانی زبان مادری  
بیانیه مطبوعاتی سازمان جهانی اسپرانتو
- 26 صفحات کردی  
شهر کریمی
- 28 صفحات عربی  
کیهان صیادپور

## Antaŭ ĉio...

Jen la 60-a volumo de revuo "Irana Esperantisto", kiu estas prezentita al karaj legantoj. En ĉi tiu numero, pro multaj problemoj, kies kialojn ne necesas menci, ni frontas al malpliigo de la paĝoj de la revuo kompare kun la lastaj numeroj. Tamen ni provis provizi riĉan kaj taŭgan enhavon.

Februare de la kuranta jaro, s-ro Reza Kheirkhah havis kelk-tagan vojaĝon al Irano, kaj ni havis la okazon plurfoje renkonti lin. En unu el tiuj renkontiĝoj, krom lia parolado pri la vivo en Tajvano, okazis ankaŭ amika babilado ĉe la oficejo de IrEA. La kovrilpaĝo bildigas tiun ĉi belan renkontiĝon.

Kaj la grava afero antaŭ ni, estas la okazigo de la 10-a Irana Esperanto-Kongreso, kies planadon bone progresas. Estas decidite, ke la ĉi-jara kongreso okazu en du partoj, ĉeeste kaj virtuale. La ĉeesta parto okazos la 27-an kaj 28-an de aprilo kaj la virtuala parto okazos sabate kaj dimanĉe, la 29-an kaj 30-an de aprilo. Pliaj informoj baldaŭ estos afiŝitaj en la koncerna retejo ĉe la sekva adreso:

[www.espero.ir/eo/irek-10/](http://www.espero.ir/eo/irek-10/)

Ni deziras novjaron plena de sukceso kaj feliĉo por ĉiuj.

Salutas; Hamzeh Shafiee

## Ĉi tiu artikolo...

Sali nu de la 60-a volumo de revuo "Irana Esperantisto", kiu estas prezentita al karaj legantoj. En ĉi tiu numero, pro multaj problemoj, kies kialojn ne necesas menci, ni frontas al malpliigo de la paĝoj de la revuo kompare kun la lastaj numeroj. Tamen ni provis provizi riĉan kaj taŭgan enhavon.

Februare de la kuranta jaro, s-ro Reza Kheirkhah havis kelk-tagan vojaĝon al Irano, kaj ni havis la okazon plurfoje renkonti lin. En unu el tiuj renkontiĝoj, krom lia parolado pri la vivo en Tajvano, okazis ankaŭ amika babilado ĉe la oficejo de IrEA. La kovrilpaĝo bildigas tiun ĉi belan renkontiĝon.

Kaj la grava afero antaŭ ni, estas la okazigo de la 10-a Irana Esperanto-Kongreso, kies planadon bone progresas. Estas decidite, ke la ĉi-jara kongreso okazu en du partoj, ĉeeste kaj virtuale. La ĉeesta parto okazos la 27-an kaj 28-an de aprilo kaj la virtuala parto okazos sabate kaj dimanĉe, la 29-an kaj 30-an de aprilo. Pliaj informoj baldaŭ estos afiŝitaj en la koncerna retejo ĉe la sekva adreso:

[www.espero.ir/eo/irek-10/](http://www.espero.ir/eo/irek-10/)

Ni deziras novjaron plena de sukceso kaj feliĉo por ĉiuj.

Salutas; Hamzeh Shafiee

Aradtemend, حمزه شفیعی

## La 10-a IrEK proksimiĝas

*Ni ŝatus informi tiujn, kiuj interesiĝas pri Esperanto en Irano, ke la 10-a Irana Esperanto-Kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de aprilo 2023 ĉeeste kaj virtuale.*

*En ĉi tiu kongreso kuniĝos instruistoj kaj aktivuloj de la lingvo Esperanto el la tuta lando por plifortigi kaj divastigi ĝin.*

*La unuaj du tagoj de ĉi tiu kongreso okazos ĉeeste ĉe la komplekso de sano, sporto kaj hidroterapio "La revo del vivo" situanta en la urbo Babolsar, kaj la finaj du tagoj de la kongreso okazos virtuale en la medio Zoom.*

*La ĉefa temo de la 10-a Irana Esperanto-Kongreso "Post-Esperanta Mondo" estis elektita por diskuti la mondan perspektivon post la plena akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo kaj la manierojn atingi tiun ĉi celon.*

*Same kiel la antaŭaj kongresoj, ankaŭ ĉi-jare serio da diversaj kulturaj kaj artaj programoj estos prezentitaj al la partoprenantoj kune kun edukaj laborrenkontiĝoj kaj sciencaj renkontiĝoj kaj prelegoj de esperantistaj fakuloj el la tuta mondo.*

*Por partopreni en tiu ĉi kongreso, vi povas akiri pliajn informojn kaj aliĝi, raportante al la dediĉita paĝo de la kongreso ĉe <http://www.espero.ir/eo/irek-10/>.*

## Ĉi tiu artikolo...

La 10-a Irana Esperanto-Kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de aprilo 2023 ĉeeste kaj virtuale.

En ĉi tiu kongreso kuniĝos instruistoj kaj aktivuloj de la lingvo Esperanto el la tuta lando por plifortigi kaj divastigi ĝin.

La unuaj du tagoj de ĉi tiu kongreso okazos ĉeeste ĉe la komplekso de sano, sporto kaj hidroterapio "La revo del vivo" situanta en la urbo Babolsar, kaj la finaj du tagoj de la kongreso okazos virtuale en la medio Zoom.

La ĉefa temo de la 10-a Irana Esperanto-Kongreso "Post-Esperanta Mondo" estis elektita por diskuti la mondan perspektivon post la plena akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo kaj la manierojn atingi tiun ĉi celon.

Same kiel la antaŭaj kongresoj, ankaŭ ĉi-jare serio da diversaj kulturaj kaj artaj programoj estos prezentitaj al la partoprenantoj kune kun edukaj laborrenkontiĝoj kaj sciencaj renkontiĝoj kaj prelegoj de esperantistaj fakuloj el la tuta mondo.

Por partopreni en tiu ĉi kongreso, vi povas akiri pliajn informojn kaj aliĝi, raportante al la dediĉita paĝo de la kongreso ĉe <http://www.espero.ir/eo/irek-10/>.





## تاسیس انجمن علمی فرارشته‌ای پان دنیا (Pandunia)



در طی سال‌های ۹۹ و ۱۴۰۰ با همکاری انجمن اسپرانتو ایران و سازمان جهانی اسپرانتو و بینارهای متعددی در دانشگاه‌های شیراز، تهران، مازندران، صنعتی اصفهان و ... صرفاً با تعامل و مکاتبه با معاونت‌های فرهنگی دانشگاه‌های متبوع برگزار شد. اکثر این وینارها با توجه به این که به صورت مستقل زیر نظر یک انجمن علمی برگزار نشدند لذا آن چنان که باید و شاید مورد توجه دانشجویان قرار نگرفت. بنابراین از پاییز گذشته در تعامل با معاونت فرهنگی دانشگاه شیراز، این فعالیت‌ها به صورت رسمی و جدی‌تر زیر نظر انجمنی تازه تاسیس تداوم یافته است: «انجمن علمی فرارشته‌ای پان دنیا». این انجمن به فعالیت‌هایی خواهد پرداخت که فراتر از یک رشته خاص می‌باشند و حداقل به ۲ رشته دانشگاهی مرتبط باشند. همچنین حتی‌الامکان فعالیت‌های این انجمن به چند زبان ارائه خواهند شد. زبان‌های فارسی، انگلیسی، عربی، اسپرانتو و حتی زبان پان‌دنیا. لازم به ذکر است زبان فارسی زبان رسمی این انجمن است. لذا از کلیه هم‌آرمانان محترم در سراسر جهان خواهشمند است در جهت شناساندن هر چه بهتر این انجمن، و در نهایت بهبود جنبش اسپرانتو همکاری لازم را مبذول بفرمایند.

انجمن علمی فرارشته‌ای پان دنیا پیشاپیش از حسن نظر همه اسپرانتودانان محترم قدردانی می‌نماید.

صلاح محمدپور

اسپرانتیست ایرانی و دبیر علمی انجمن فرارشته‌ای پان دنیا

### Refunkcio de IrEA-Oficejo post tri-jara halto pro la pandemio

Kiam la pandemio trafis, same kiel multaj aliaj oficejoj, ankaŭ la oficejo de Irana Esperanto-Asocio haltis ĉiujn kunvenojn kaj ĉeestajn servojn. Sed nun, post tri-jara halto, ŝajnas ke ni povas reveni al niajn kutimajn fizikajn renkontiĝojn.

Ĉi-februare, s-ro Reza Kheirkhah, irana esperantisto kiu loĝas en Tajvano, vizitis sian hejmlandon. Okaze de tiu evento, estis aranĝita ke okazu amikecan kunvenon de iranaj esperantistoj en la oficejo de IREA. En la kunveno partoprenis sep personoj kaj la partoprenintoj ĝuis la etoson de ĉeesta kunveno. Reza prelegis pri la vivo en Tajvano kaj tiea e-movado. Fine de la kunveno, ĉiuj esprimis siajn dezirojn por ke tiu ĉi kunveno estu la komenco de refunkciado de monataj prelegoj kaj aliaj ĉeestas kunsidoj.

Menciindas ke la tuta programo estis vive elsendata por ne-ĉeestantoj pere de Zoom.




### نخستین نشست و گپ و گفت دوستانه در دفتر انجمن پس از دوران کرونا

با شروع پاندمی کرونا و توقف بسیاری از فعالیت‌های جمعی و حضوری، دفتر انجمن اسپرانتو نیز بر روی مراجعین حضوری بسته شد و برنامه‌های نشست‌های اسپرانتویی نیز متوقف شد.

اکنون پس از سه سال وقفه، به نظر می‌رسد بتوان به شرایط عادی بازگشت و برنامه‌های ملاقات‌های حضوری را از سر گرفت.

بهمن ماه امسال، آقای رضا خیرخواه، اسپرانتودان ایرانی مقیم تایوان، سفری چند روزه به ایران داشتند. این سفر بهانه‌ای شد تا برای برگزاری یک نشست دوستانه اسپرانتویی در دفتر انجمن برنامه‌ریزی صورت پذیرد تا همه بتوانند بعد از مدت‌ها دیدارهای حضوری داشته باشند و در عین حال از مصاحبت با رضا بهره‌مند شوند.

این نشست در تاریخ ۱۸ بهمن ماه در دفتر انجمن صورت پذیرفت و طی آن رضا درباره زندگی در تایوان و جنبش اسپرانتو در این جزیره سخنرانی نموده و در پایان بحث آزاد و پرسش و پاسخ حسن ختام برنامه را شکل داد. لازم به ذکر است که تمامی این برنامه به صورت زنده از طریق زوم پخش گردید تا همگان بتوانند از آن بهره‌مند شوند. تصویر زیر توسط جناب آقای کوثری از محیط زوم در هنگام برگزاری این جلسه گرفته شده است:





## ***Pri-Esperanta kunveno en sanitorio en Babolsaro***

### ***Kun partopreno de pli ol 30 Personoj***

S-ro Reza Kheirkhah (elp. ĥejrĥah) vizitis urbon Babolsaro la 9-an de septembro 2023. Babolsaro estas ĉe la Kaspia Maro en Irano, situanta en la provinco Mazandarano. Multaj gesinjoroj, kiuj interesiĝis ekscii pri Esperanto, partoprenis en la kunveno en la sanitorio, kies estro, s-ro Gholamreza

Azarhoushang (elp. golamreza azarhuŝang), estas ankaŭ aktiva esperantisto.

Pli ol 30 personoj partoprenis en la kunveno. Ili estas lernantoj de Yumeiho (elp. jumejho), japana terapio, kiuj laboras en la sanitorio. Unue Reza parolis pri la rolo de Esperanto en sia vivo, ekzemple kiel li





vojaĝis tra la mondo pere de Esperanto, kiel li restis en Eŭropo dum unu jaro, kaj kiel li fariĝis profesia Esperantisto dum 10 jaroj en Japanio instruante la lingvon, farante ankaŭ multajn prelegojn, kaj iniciatante songazeton Najtingalo. La songazeto vendiĝis je miloj da ekzempleroj en Japanio, Koreio, Irano kaj ankaŭ ĉe la libro-servo de UEA.

Poste s-ro Azarhoushang klarigis kiel li kaj lia edzino lernis Esperanton dum la milito inter Irako kaj Irano kaj kiel li uzante Esperanton komencis kunlaboron kun la majstro Saionji Masayuki (elp. sajonĝi masajuki) en Japanio (kiu kreis la novan terapi-metodon Yumeiho) kaj poste vizitis multajn landojn ĉefe en Eŭropo por disvatigado de Esperanto kaj Yumeiho.

La kunveno kies originala tempo-plano estis por 30 minutoj daŭris pli ol horo pro la entuziasmo kaj demandoj de la aŭskultantoj. Ili kaj ĝuis la humuran paroladon de Reza kaj konatiĝis kun la avantaĝoj, kiujn havas

lernado de Esperanto. Hazarde samtage atingis pako de lernolibroj de Esperanto kaj aliaj materialoj kiujn mendis mi (la verkinto de tiu ĉi raporto) kaj volis uzi por la baldaŭa kurso de Esperanto kiu okazos en la sanatorio. Sed iuj lernolibroj estis tuj aĉetitaj per la partoprenantoj de la prelego! Nuntempe okazas nova Esperanto-kurso kun 21 lernantoj kies instruisto estas S-ro Mamduhi. La kurso estas virtuala ĉar la instruisto kaj gelernantoj loĝas en diversaj urboj.


Baldaŭ Babolsaro fariĝos ne nur centro por homoj, kiuj tra la lando venos por kuracado, sed ankaŭ centro por Esperanto kaj Esperantistoj. La venonta Irana Esperanto-Kongreso (IrEK-10) okazos en Babolsaro kaj en la sanitorio.

D-rino Zahra Karimi

(prof. pri ekonomiko ĉe la Universitato de Mazandaran)



# Ĉu Zamenhof mortis?



# Kaj kio pri Ĉerĉil [Churchill]?

Ĉu Zamenhof mortis? Kaj kio pri Ĉerĉil [Churchill]



Certe ili mortis, sed iliaj ideoj ankoraŭ vivas kaj efikas hodiaŭ.

Ĉiuj konas la malnovan ŝercon:

*Esperanto ne estas lingvo kun interna ideo sed Esperanto estas ideo kun interna lingvo*

Kio estas ĉi tiu ideo? El parolado de Zamenhof (1906):

*"Al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo - vi ĉiuj sentas ĝin tre bone - estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.. ."*

Do, Esperanto estis ankaŭ reago al la

naciismaj ideo-fluoj de la 19-a jarcento:

*Benedikt Hjartarson, Anationalism and the Search for a Universal Language - Esperantism and the European Avant-Garde*



Sed aliaj homoj en Francujo, Britujo kaj iugrade Usono havis alian internan ideon:

rego fare de blankuloj de la cetera mondo

*"Rhodes pensis pri sekreta elito de anglaj-saksaj homoj dediĉitaj, kiel la filozofistoj de Platono, porti aŭtoritaton kaj ordon al la tuta mondo, kiuj regos aliajn popolojn por ilia bono mem. Ĉi tiuj dediĉitaj junaj homoj devis esti eltiritaj el Britujo, Norda Ameriko kaj Germanujo, ĉar Rhodes rigardis tiujn landojn ne nur kiel vere blankajn sed ankaŭ destinitajn por mondo-regado. "*

John Ruskin, la plej alte taksta artisto de la 19-a jarcento, en sia inaŭgura parolado en Oksfordo: *"Estas nun destino ebla por ni,*



*la plej alta iam ajn metita antaŭ nacio, kiun ni povas akcepti aŭ rifuzi, Ni estas ankoraŭ nedegenerita raso, raso miksita de la plej pura norda sango...Anglujo...devas fondi koloniojn kiel eble plej vaste..."*

Klare ĉiuj planoj de Rhodes, de la brita registaro kaj de aliaj koncernatoj en Britujo konsideris kiel lingvon de la estonta imperio nur la anglan. Nenio alia esti eĉ pensebla. Revoj pri egaleco kiel tiuj kunligitaj kun Esperanto tute ne trovis lokon en la rasisma-imperiisma sinteno de la epoko, en kiu Esperanto naskiĝis.

Same en Francujo: La francoj klopodis disvastigi la francan kulturon kaj la francan lingvon. La disvastigo de la lerneja sistemo laŭ la principoj de la revolucio helpis pri tio. Ekzemple ni vidu tion, kio okazis en la Provinces Illyriennes



Arthur de Gobineau (1816-1882) Essais sur l'inégalité des races humaines de 1855: *la raso hinda-europa estas la prapatro de ĉiuj estraj klasoj de Europo, kaj aparte de la francaj nobeloj (al kiu li apartenis).*

La unua granda vera atenco al Esperanto estis tiu de Francujo che la Ligo de Nacioj


La franca delegito: *"Jam ekzistas internacia lingvo: la franca, universale instruata chie en la mondo de la penso."*

Francoj evidente ne rimarkis, ke la rolo de la franca jam estis minacata de la angla.

**Sed la britoj pluiris.**


En la unua duono de la 20-a jarcento, la pure rasismaj konsideroj de la antaŭa jarcento estas forlasitaj sed ne la ideoj pri la supereco de la angla civilizo.

Ideojn pri tiu supereco havis Charles Kay Ogden (1889 – 1957), angla lingvisto kaj verkisto. En 1925 li produktis sian Basic English (Baza angla), plene priskribita en libro aperinta en 1930. Temis pri ideo disvastigi en pli facila maniero la konon de la angla lingvo al ĉiuj.



Ogden estis konvinkita, ke la mondo bezonas malaperigi malgrandajn lingvojn laŭgrade kaj uzi laŭeble nur unu, la anglan en formo simpla aŭ kompleta.


La afero estis vaste konata en Britujo kaj laŭdata.



1933 "The Shape of Things to Come" de H. G. Wells.

George Orwell estis unu el la subtenantoj de Basic English ĝis 1945

**Post la 2-a mondmilito:**



I. A. Richards promociis ĝian studon en ĉinaj lernejoj. Voice of America, ktp.

Tio, kio ankoraŭ hodiaŭ estas uzata estas la baza vorto-listo



de 850 vortoj kiel komenca vortaro de lernantoj tra la tuta mondo.

En 1943 Winston Churchill faris faman paroladon en la universitato de Harvard. Ĝi estas konata ĉefe pro unu frazo:

***“Tiaj planoj ofertas tre pli bonajn kompensojn ol forpreni provincojn aŭ landojn de aliaj popoloj aŭ ekspluate subtrete ilin. La imperioj de la estonta tempo estos la imperioj de la menso.”***

*“La donaco de komuna lingvo estas tre valora heredaĵo, kaj ĝi povus iam iĝi la bazo de komuna civitaneco. Mi ŝatas pensi pri britoj kaj usonanoj travagantaj libere tra la posedaĵoj de unu aŭ de la alia. Sed mi ne vidas kial ni ne devus provi disvastigi nian komunan lingvon eĉ pli vaste tra la mondo kaj, ne serĉante egoisman avantaĝon je la kosto de iu ajn, mem posedi ĉi tiun altvaloran agrablan ilon kaj nian naskiĝ-raĵton je ĝi.*

....

*Antaŭ kelkaj monatoj mi konvinkis la Britan Ministraron starigi ministran komitaton por pristudi la Basic English kaj raporti pri ĝi. Jen konkreta plano.<sup>1</sup>*

La brita registaro jam en la jaro 1947 aĉetis la rajtojn de Basic English kaj starigis Fondaĵon pri tio. En 1956 ĝi reasertis sian politikon en ĉi tiu kampo: ***“En unu generacio de nun la angla povus esti monda lingvo, tio estas***

1 A Basic English Foundation has been created, according to the Minister of Education, “to propagate the teaching and study of Basic English as an international and educational medium and thereby to increase the knowledge of English among mankind.” A grant-in-aid of some £18,600 is to be given by the Government to the Foundation.

The sum of £23,000 has already been paid by the Government to the inventors (if that is the right word) of Basic English for his copyrights. I have nothing to say against Basic English as such, but this official endowment of it is a strange business. Further light on the subject seems called for.

En artikolo de 1947: <http://archive.spectator.co.uk/article/27th-june-1947/5/a-basic-english-foundation-has-been-created-accord>

***universala dua lingvo en tiuj landoj, kie ĝi ne jam estas la gepatra aŭ la plej grava lingvo.”***

Nenio ŝanĝiĝis de la tempoj de Churchill. La agado estis intenca.

Vidu la libron: Phillipson, Robert (1992), *Linguistic Imperialism*, Oxford: Oxford University Press.



Ni ne bezonas paroli pri la nuna situacio. Ĉiuj konas ĝin.

La angla regas kaj Esperanto ankoraŭ strebas disvastiĝi.

Ĉu la persekutoj de Hitler kaj Stalin en la fino estis pli danĝeraj al la ideo de internacia, neŭtrala planlingvo ol la nepresekuto sed zorgado pri alternativa projekto anoncita de Churchill?

En la dua duono de la pasinta jarcento estis ĉefe la potenco de Usono, kiu puŝis la anglan lingvon,

Ĉiuj landoj, krom la komunismaj landoj, troviĝis, kiel diris ŝerco meksika ŝtatprezidanto pri Meksiko “malproksimaj de Dio kaj proksimaj de Usono.”

Kun tre malmultaj esceptoj la regantoj de la aliaj landoj aktive kunlaboris. kaj tamen la viruso montris, ke la mondo estas unu kaj ke ĝi ne bezonas militon, perforton kaj sankciojn sed pacon, kunlaboron kaj solidarecon.

**Esperanto estas la lingvo por tio. Vivu la ideoj de Zamenhof!**





## کنگره جهانی اسپرانتو،

### سال ۲۰۲۴ در آفریقا

داد. این همکاری چند جانبه و بین‌المللی بود. با این تصمیم، هیأت مدیره UEA همچنین به تعهدات این سازمان عمل می‌کند که در دهه گذشته برگزاری کنگره جهانی در آفریقا را به عنوان یک راهبرد استراتژیک برای UEA اعلام کرده بود.

سازمان جهانی اسپرانتو، اکنون با فعالان محلی برای تعیین تاریخ برگزاری، کمیته کنگره محلی، موضوع و سایر جزئیات یکصد و نهمین کنگره جهانی اسپرانتو همکاری خواهد کرد. مرکز همایش، مرکز کنوانسیون بین‌المللی آروشا خواهد بود، مکانی پیشرفته برای رویدادهای بین‌المللی که قبلاً میزبان رویدادهای سازمان ملل بوده است. دپارتمان کنگره و هیأت UEA همچنین با همه طرف‌های مرتبط با برگزاری کنگره، اعم از جنبش اسپرانتو یا نهادهای محلی در تانزانیا، همکاری خواهند کرد. اکنون می‌توان با کمک مالی به بنیاد آفریقای UEA از صد و نهمین کنگره جهانی حمایت کرد:

[uea.org/alighoj/donaciones/afriko](http://uea.org/alighoj/donaciones/afriko).

همچنین ارزش دارد که به صد و هشتمین کنگره جهانی اسپرانتو که در سال ۲۰۲۳ در تورین ایتالیا برگزار می‌شود پیوندید. [uk.esperanto.net/2023](http://uk.esperanto.net/2023).

سازمان جهانی اسپرانتو کنگره سالانه خود را در سال ۲۰۲۴ در آروشا، تانزانیا برگزار خواهد کرد.

برای یکصد و نهمین کنگره جهانی اسپرانتو (UK) که در سال ۲۰۲۴ برگزار خواهد شد، هیأت مدیره سازمان جهانی اسپرانتو به اتفاق آرا تانزانیا را به عنوان کشور محل برگزاری کنگره انتخاب کرد. این برای اولین بار است که کنگره جهانی اسپرانتو در قاره آفریقا برگزار می‌شود. شهر میزبان، آروشا، یک مقصد گردشگری بین‌المللی است، اما علاوه بر آن، این شهر همچنین یک شهر دیپلماتیک مهم، مقر جامعه آفریقای شرقی و دادگاه آفریقایی اتحادیه آفریقا است.

منطقه آروشا بیش از ۲ میلیون نفر را در خود جای داده است. این منطقه در شاخه شرقی دره بزرگ ریفت، تحت آب و هوای معتدل واقع شده است. این شهر به پارک ملی سرنگتی، منطقه حفاظت شده نگورونگورو، پارک ملی دریاچه مانیارا، دره اولدووا، پارک ملی تارانگیر، کوه کلیمانجارو و کوه مرو در خود پارک ملی آروشا نزدیک است.

انجمن اسپرانتو تانزانیا (EATA) پس از سالها کار توسط کمیسیون آفریقای UEA، دعوت به برگزاری کنگره‌ای در آروشا کرد که وظیفه هماهنگی انجمن‌های کشوری در این قاره را برای تعیین دعوت‌کننده اولین کنگره جهانی در آفریقا انجام

Unu jaron post la aperigo de nia revuo, nome en la jaro 2002, s-roj Torabi kaj Dolatshahi faris intervjuon kun s-ino Sagafjan cele por aperigi en la revuo. Bedaŭrinde tiu intervjuo ne estis publikigita pere de la revuo, sed poste estis metita en la retpaĝaro "perespero.com" perslingve. La esperanta traduko de la intervjuo neniam aperis ie. Do, pro la historia graveco de tiu ĉi intervjuo, ni publikigas la esperantan tradukon en tiu ĉi numero.

La red.



### *La historio neniam estu forgesita*

*Intervjuo kun s-ino Sagafjan*

**Moŭlud Sagafjan** estis la unua Esperanto-instruisto el Irano, kiu finis la trejnadon eksterlande kun la edukaj normoj de sia tempo. Unu el la tri instruistoj de Esperanto komence de la nova periodo de prospero kaj ekspansio de Esperanto en Irano 1975. La unua instruisto estas d-ro Nasereddin Saheb Zamani kaj la dua, Zila Sedighi. Moŭlud Sagafjan estas la unua iranino, kiu trapasis la edukan Che-metodon en Nederlando kaj en Internacia Esperanto-Instituto (la centro por disvastigo de la eduka metodo de Che). Ŝi instruis Esperanton al centoj da homoj

dum pli ol 12 jaroj. Ŝi estis la plej profesia Esperanto-instruisto dum sia instru-kariero en Irano.

Fine de oktobro 2013, unu el miaj amikoj informis min, ke s-ino Moŭlud Sagafjan revenis el Ameriko kaj mallonge restos en Irano kaj ŝatas renkontiĝi kun amikoj esperantistaj... . Tiu ĉi renkontiĝo okazis ĉe ŝia domo sur Norda Iranŝahr strato, en Tehrano.

**Dolatshahi:** Ni verkas pri la historio de Esperanto en Irano, ekde la fruaj tagoj, kio estas ekde 1900, kiam Esperanto havas



prezenton en Irano.

Bonvolu klarigi vian konatiĝon kun Esperanto. Kiel vi renkontis Esperanton? Kiel vi lernis Esperanton? Kiuj estis viaj instruistoj? Kiujn librojn vi legis? Kaj kiuj estis viaj samkursanoj?

**Sagafjan:** Vi estas tre afabla veni kaj mi estas je via servo. Mi estis instruisto kaj ĉiam volis lerni ion kaj ne interesiĝis famiĝi. Mia konatiĝo kun la lingvo Esperanto komenciĝis kiam mia 14-jara filo havis mensajn problemojn en la aĝo de pubereco, kaj post multe da vagado, pere de amiko renkontiĝis s/d-ron Saheb Zamani.

D-ro Saheb Zamani estis fama psikologo en Irano kaj bonvole akceptis mian filon. Lia servo estis tre valora kaj mi mem dormis 40 noktojn en la hospitalo. Li akceptis nin kun malfermitaj brakoj kaj prizorgis mian filon dum tri kaj duono jaroj tute senpage. Li faris la tiel nomatan “specialan terapion”. Mia filo prenis 7-8 pilolojn tage, kaj post 3 jaroj kaj duono kiam trapasis la enirekzamenon de univesitatoj, la nombro da piloloj atingis kiel duonan lenton tage. Estis granda kaj profunda salto, ke mia filo resaniĝis. Li nun estas profesoro ĉe la Universitato Virĝinio en Usono.

Fakte, dum la 22 jaroj de konatiĝo kun s/d-ro, mi lernis multajn aliajn aferojn krom Esperanto. Li estis bonega gvidisto rilate al psikologio, per kiu mi povis administri mem en Ameriko. Iun tagon li diris al mi, ke li havas prelegon en unu el la kulturaj komunumoj de instruistoj kaj se mi ŝatus, mi povus partopreni!

**Dolatshahi:** En kiu jaro tio okazis?

**Sagafjan:** Ĝi estis en 1974. Sed tiam ĉar mi disiĝis de mia edzo kaj mi volis iri Anglujon por eduki kaj tie vivi, sed kiam mi vidis, ke la d-ro instruas ĉi tiun lingvon, mi diris al mi mem, por ke mi povu servi, devas serĉi laboron, kiun ne ĉiuj sekvas kaj ne estu en ĝi profito materia. Precipe ĉar li estis al mi tre kara kaj ĉiam estos, kaj li persvadis min en ĉi tiu afero. En la komonumo dum parolado, li mem klarigis al mi la lingvon, vortojn kaj

tradukon.

**Dolatshahi:** Ĉu vi scias kiam kaj kie ĉi tiu parolado okazis?

**Sagafjan:** Unuafoje estis 1974 kaj mi partoprenis la duan kurson en 1975, sed kie precize mi ne scias. Eble en universitato – eble ne, aŭ hejme. Mi ne scias precize kie estis tiu loko. Lia servo, al mi kaj mia filo, kaŭzis min okupiĝi pri Esperanto. Se vi volas verki artikolon pri Esperanto, mi proponas, ĉi tiun temon: “La sunleviĝo de Esperanto post la eklipso de 50 jaroj da silento”. Sinjoro doktoro estis fame konata en Irano, pro dum-jaraj servoj en la oficejo Bonfarto. Li estis majstro pri la teologio de s-ro Rafsanjani kiu havis tre bonan reputacion -- kaj ĉar tiam estis etikedeca misfamo pri Esperanto en Irano, la popolo evitis Esperanton—, la doktoro povis revivigi Esperanton, kaj ĉiukaze eĉ en universitatoj ne estis facile prezenti la lingvon.

Kiam li instruadis kaj disvastigis la lingvon, jam renkontis multajn problemojn ekz, tie kie ni kunvenis kun ĝardeno kaj tre granda loko, situis ĉe la usona ambasadejo. Oni maldaŭrigis nin, li multe klopodis kaj sukcesis restarigi ĝin. La vero ne povas esti ignorita. Se pro tia homo kun altedukado, kaj la servoj kiujn li faris rilate psikologio en la socio, ankaŭ instruante religiulojn kiel s-ro Rafsanjani, kiu ankoraŭ laboras nun, se la patro de la doktoro ne estis fama religia persono, se ne estus lia sperto kaj efikeco, Esperanto ne povus viviĝi. Tio estas, tiu ĉi la 50-jara velkita plantido devus esti replantota kaj reviviĝi. Mi tiam ne volis plu resti en Irano kaj por forgesi la memoron pri mia disiĝo, mi iris al Eŭropon por jaro kaj lernis gramatikon en la persa lingvo.

**Dolatshahi:** Kiun libron vi studis kiam vi partoprenis en la Esperanto-klaso? Kaj en kiu loko?

**Sagafjan:** Mi nun ne scias la ĝustan lokon. Foje Esperanto-klaso okazis en la domo de filino de s-ro Ĥomejni – kio ne ĝuste ebla en la antaŭa Pahlavi reĝimo. Li instruis unuan kurson sekrete.

**Dolatshahi:** Kompreneble, ĝi ne estis la unua kurso, eble ĝi estus la kvara kaj kvina kurso.

**Sagafjan:** Eble, sed mi partoprenis la duan kurson. Ni estis pli komfortaj, 6-5 el ni restis ĝis la fino. Kiam mi iris al Eŭropo kaj nur restis ankaŭ sinjorino, kies vizaĝon kaj nomon mi forgesis, ĉar ni ne plu havis kontakton unu kun la alia. En tiu tempo, la bombado pro milito kun Irako estis komenciĝinta.

**Dolatshahi:** Kion vi lernis en via E-kurso?

**Sagafjan:** Kompleta gramatiko de la lingvo Esperanto en la persa.

**Dolatshahi:** Ĉu vi studis libron “La dua lingvo”?

**Sagafjan:** Ne, li instruis per siaj klarigoj. “La dua lingvo” ankoraŭ ne estis eldonita. Mi tre bone lernis la gramatikon. Li prezentis min al UEA. Mi iris al Eŭropo la 16-an de aŭgusto 2015, kaj mi mem kovris ĉiujn elspezojn, kaj mi iris per mia propra mono, kaj ankaŭ mi enmetis monon en la UEA-konton, mi deponis ĝin en IEI aŭ Den Hag.

Somere de la sama jaro, mi ekkomencis paroli la lingvon, kaj la sekretario de uea-oficejo donis al mi ĉambron, kiu estis sekura loko kaj la respondeculo estis tre sperta viro. Sed Nederlando ne donis al mi vizon, ĉar ili diris, ke mi, estante fremdulo, kiel mi povus havi tiom da mono ĉe mi. Ili diris, ke vi volas murdi, vi havas atencan. Mi iris al Germanio malespere kaj estis prezentita al familio kie estis ankaŭ 4 germanaj studentoj. Ili donis al mi ĉambron, kaj tre bone akceptis min. Kiam mi estis en Germanio dum 3 monatoj, en alia loko mia ĉambro estis apud la ĉambro de profesoro Frank. La profesoro, kiu tie estis unu el la administrantoj de Esperanto kaj organizis la eŭropan konferencon, estas interesa kaj fama profesoro, kiu bone instruis Esperanton.

Post tio, miaj tri monatoj finiĝis. Mi aŭdis, ke ekzistas sinjorino nomata Arvin kaj mi aŭdis, ke ŝi servis en Barato dum 11 jaroj ĉar ili ne havis instruistojn en Barato. UEA sendis tiun ĉi francan sinjorinon al Hindio. Mi petis al samideano Milosevic la adreson de s-ino Edvino, kaj li tuj donis al mi la adreson kaj telefonnumeron. Li nun estas forpasinta kaj estis viro, kiu multe servis ĉi tiun lingvon. Sinjorino Edvino estis efektive

mia instruistino. Mi iris al Francio, en Parizo, kaj ŝi tie havis malnovan amikon. Edvino havis malnovan apartamenton en la sudo de Parizo, kio estis tre malmultekosta kaj konvenis al mia buĝeto. Ŝi donis al mi ĉambron en la kvina etaĝo kun mebloj. Ni okupiĝis. Edvin estis mia instruistino por 5 monatoj. Mi ankaŭ reciproke bone pagis al ŝi kion meritis.

**Torabi:** Ĉu vi studis Esperanton?

**Sagafjan:** Mi lernis “Che”-metodon de li kaj nun mi instruos ĝin al vi ĉar ĝi ne devus esti perdita.

**Dolatshahi:** Kompreneble, sinjoro Torabi estas instruisto pri tia metodo.

**Sagafjan:** Des pli bone! tio estas pli bona! kie vi lernis s-ro Torabi?

**Torabi:** Mi studis en Hago.

**Sagafjan:** Ni studis tag-nokte kaj havis multajn amikojn kaj ŝi (Edvin) diris ke mi estis la sola diligenta kaj interesita studento inter ŝiaj studentoj en Eŭropo. Mi estis instruisto kaj mi volis lerni. Post 5 monatoj, ni aliris la Universalan Kongreson en Islando. La unua kongreso en kiu mi ĉeestis. Pasiginte 3 monatojn en Francio, sinjoro doktoro skribis al mi leteron, ke se vi estas kontenta pri la loko kaj eblas, li povas sendi sian edzinon, sinjorinon Jila Sediqi. Mi jesis la aferon. Ŝi venis kaj aliĝis al mi. La loĝejo estis malmultekosta kaj malnova loko. Ŝi tradukis kaj per la gvido de d-ro Saheb Zamani, la horaro de s-ino Sediqi estis difinita. Ni praktikis interparolon, kaj ŝi ellernis tre profundan konversacion kaj faris bonegan progreson. Ni estis kiel du fratinoj aŭ patrino kaj filino. Ŝi laboris nokte kaj estis aktiva, mi dormis nokte kaj vekigis frue matene. Mi memoras en tiu tre malgranda loko ni havis amon al ĉi tiu lingvo kaj ankaŭ unu al la alia. Tiu ĉambro estis por ni kvazaŭ palaco, tago kaj nokto ne gravis por ni.

Edvino kaj sinjorino Sediqi kaj mi iris al Danio, mi iris al klaso tie, la fratino de sinjorino Sediqi aliĝis al ni, kaj ni estis en Kopenhago, kaj poste ni iris al Islando. Estis tre bona semajno. La instruisto kaj mi estis najbaroj unu al la alia en la hotelo.





Verda Domo. D-ro Saheb Zamani kaj kelkaj esperantistoj

Post reveno ĉar mi estis instruisto, mi tre bone lernis la mapon de la metroo de Parizo. Mi tre bone traktis mian vivon en Parizo kaj Edvin estis tre simpatia kaj multe helpis min pri mia franca lingvo. Mi ne dubas, ke ŝi estis studento de Che. Mi iris al Holando kaj vidis sinjoron Che en la maljunulejo. Li estis feliĉa vidi min. Mi ĉeestis lian naskiĝtagon. Li disponigis valorajn servojn. mi demandis la s-ron, vi tiom laboris por mi, kiel mi povas kompensi? Li diris, ke se vi volas servi, servu Esperanton kaj ne lasu ĝin flanken. Ni filmis lin kaj revenis al Francio. Poste ni iris al Islando.

Postan jaron foje li sendis leteron, ke li tute ne fartas bone. Por lia naskiĝtago mi sendis monon el Irano. sed atingis tien en la tago de lia morto kaj liaj amikoj demandis min ĉu resendi ĉi tiun monon aŭ uzu por lia tombo, kaj mi respondis por prepari lian tombon.

Ekde 1977 kiam mi revenis al Irano ĝis 12 jaroj poste, kun gesinjoroj Sahebzamani ĉiuj estis en la servo de E-o tutkore kaj anime.

**Dolatshahi:** Kiam vi venis al Irano, kie okazis la kursoj de d-ro Saheb Zamani kaj sinjorino Sediqi? Ĉu ĝi estis sur la loko de la vegetara komunumo aŭ ne?

**Sagafjan:** Estis lernejo kiu estis je nia dispono kaj mi komencis instrui tie.

**Dolatshahi:** Kion vi respondecis?

**Sagafjan:** Mi administris la konversacian parton, sed ne per la Che-metodo. Ni parolis Esperanton kaj ofte faris demandojn kaj montris ilojn por lerni Esperanton. Ĉiuokaze, ni havis libron pri konversacio. Post tio, la

doktoro komencis la seriozan laboron. Ekzistis instruistoj kiuj havis individuajn klasojn en 1980 kaj kolektis studentojn. Mi memoras, ke ni renkontis kelkajn problemojn.

Li plejparte instruis gramatikon laŭ sia metodo. La vera instruado de la lingvo estis la gramatiko, preparitaj hejmtaskoj aŭ plurkopioj, kiujn la lernantoj devis fari. Multaj lernantoj laboris kaj volis lerni kaj sukcesis.

Mi laboris kiel konversaciisto kaj sinjorino Sediqi ankaŭ sekvis ŝian laboron per tradukado. Ni faris kelkajn belajn fotojn kun la lernantoj en tiu spaco, unu el kiuj ili pligrandigis kaj donacis al mi.

Por daŭrigi Esperanton necesas financaj rimedoj, kaj ankaŭ amo. Kvankam mi estis enamiĝinta al Esperanto, mi ne povis daŭrigi instrui Esperanton eksterlande, bedaŭrinde. Mi intencis iri al Usono kaj devus lerni la anglan por povi vivi en tiu medio kaj ĉar ŝatis edukadon, do tiun sekvis

**Dolatshahi:** Kion vi studis?

**Sagafjan:** Biologion. Mi en Irano instruis biologion. Mi akiris mian postdiplomon en Dallas ĉe Peleno College. Pro la lingvo, mi devis preni mallongajn klasojn, kaj dum ĉiuj 8 jaroj, edukad-sistemo en Usono akceptis pagi por miaj libroj, studpago kaj benzino. Mi studis tute senpage. Senpage ĉar mi havis loĝpermeson. Ili diris, ke vi povas studi kiom longe ajn vi volas.

**Dolatshahi:** Ĉu vi memoras iun el viaj studentoj, kiuj estis esperantistoj, kiujn ni konas hodiaŭ?

**Sagafjan:** Sinjoro Azari, kiu estas profesoro mem kaj ĉeestis en la kurso de d-ro. Sinjoro Mamduhi estis tre aktiva, li multe laboris. Mi pensas, ke vi ankaŭ lernis la lingvon per la libro "la dua lingvo"! Tiu libro estis tre grava libro pri kiu la d-ro tre multe laboris kaj necesis unu somero por ke tiu libro atingis sian pinton. Mi pensas, ke ankaŭ gesinjoroj Karam-od-dini lernis same. Tiam s-ro Karam-od-dini estis instruisto en gimnazio. Entute kio estis instruita en la kursoj de d-ro, ne nur temis la lingvon, li havis larĝan mondkoncepton.



**Dolatshahi:** Kiuj estis viaj studentoj?

**Sagafjan:** Ni 3 kune instruis. Ĉiuj niaj studentoj sinjoro Kheirkhah, f-inoj Ŝirin kaj Giti Ahmadnia, s-ino Fahmi. Ankaŭ s-ino Samadi, Dio kompatu ŝin, kiu forpasis, s-ino Erfani kaj s-ro Khoshmashraban .

**Dolatshahi:** Kiel vi tri administris kurson en unu periodo?

**Sagafjan:** Fakte, la komencantoj per d-ro lernis, mezan nivelon s-ino Sedighi kaj dialogon mi. Ĉu vi laboris kun mi?

**Dolatshahi:** Ne, mi estis tie ekde 1982 ĝis “Iran-Esperanto” estis fermita. Mi havis renkontiĝon kun la d-ro kaj kun s-ino Sediqi kaj s-ro Karam-od-dini kaj ankaŭ kun s-ro Kohan.

**Sagafjan:** Ĉu vi instruis per la libro “Ellernu”?

**Dolatshahi:** Ne. La libro “Konversacia Kurso de Szilagyi” estis tre bona, humura libro, kaj lernantoj ĝuis ĝin, kaj la skribaĵojn kiujn mi havis estis miaj propraj konversaciaj notoj aŭ mi ricevis ilin de la d-ro, kaj mi ne estis sufiĉe bonŝanca esti je via servo.

**Sagafjan:** La 13-an de aprilo 1988 mi iris al Maŝhado el Tehrano per trajno. Tehrano estis forlasita pro la bombado (milito kun Irako). Mi iris al Maŝhad kaj tranoktis en la maŭzoleo de Imam Reza dum unu nokto. La sekvan tagon mi prezentis min al edukad-oficejo. Ili donis al mi kurson, kiu estis ĉambro kun kovrilo kaj nigra tabulo. Mi estis tie dum semajno. Ĉar la lernejoj estis fermitaj, nur la lerneja servisto estis tie.

Sinjinorino Naraghi estis unu el miaj bonaj lernantoj kiu havis postenon en Iran Air

oficejo kaj informis min, ke ĉar la biletoj estas vendotaj po dolaro ekde morgaŭ, venu kaj foriru el Irano pagante tomanojn. Mi renkontis multajn problemojn en Eŭropo. Mia kazo estis en Aŭstrio. Mia plej aĝa filo entreprenis mian eksterlandiĝon ekde la antaŭa jaro. Kiam mi volis iri, en Irano ĉiuj konsulejoj estis fermitaj pro la milito. Sed mi havis germanan esperantistan amikon, kies familion mi renkontiĝis en Grésillon/ Francio, kaj nia amikiĝo jam daŭris kaj mi skribis al li, ke mi volas viziti Germanujon dum unu monato. Mi iris al Germanujo sed restis dum 4 monatoj kaj duono, ĉar mia filo petis por mi el la usona konsulejo en Frankfurto, kaj oni alportis mian kazon el Aŭstrio al usona ambasadejo (Frankfurt). La procezo daŭris 4 monatoj kaj duonmonato. Mi ne dormis dum 19 noktoj, pensante kion fari. Mi devus iri aŭ al Japanio aŭ al Turkio, ĉar ili ne bezonis vizon. Aŭstrio ankaŭ ne donis al mi vizon. Mi ricevis vizon de Germanio por 3 monatoj. Poste mi ricevis vizon de Usono ĉar mia filo estis profesoro ĉe la Universitato Virĝinio, do ili bonvenigis min.

**Dolatshahi:** Ĉu vi komunikis kun esperantistoj en Usono?

**Sagafjan:** Jes, mi anoncis mian preton instrui en Kalifornio, kaj kursoj estis somere, kaj ne eblis al mi gvidi aŭtune . Mi eniris urbon nomatan “Idaho”. Mi estis en kontakto tie kaj ricevis e-revuojn.

Vi eble notis en la antaŭa numero de la revuo “Irana Esperantisto”, ke la Esperanto-movado okazis en Tabrizo ĝis 1955, kiu estis la tiel nomata konstitucia epoko.

Sed Doktoro Saheb Zamani multe laboris. Li komencis en 1977, kaj 30 jaroj pasis de 1973 ĝis 2003, kaj mi esperas, ke ĝi ne finiĝos, sed bedaŭrinde, tio ne estis menciita en via revuo, kaj tio estas iom malĝusta.

**Torabi:** Jes, ni silentis kaj fakte, bedaŭrinde, pro diversaj kialoj, ni neniam povis fari logikan rilaton kun la doktoro. Fakte, faŭlto estis kreita kaj malgraŭ niaj klopodoj, ni ne povis forigi la breĉon kaj krei ponton. Mi pensas, ke ĉi tiu afero pli rilatas al la



diferenco inter generacioj kaj la diferenco de vidpunktoj. Kreiĝis miskomprenoj, kiuj bedaŭrinde fariĝis tre severaj kaj eĉ prenis translimajn dimensiojn. Vi ne estis en Irano. Ĉar ĉi tiu revuo estas eldonita en la publika areno, ni ne provis plivastigi ĉi tiun temon. Bedaŭrinde, ni ne povis kontentigi lin kaj krei taŭgan komunikadon, eble estis reciprokaj miskomprenoj. Ni silentis por ne nutri miskomprenojn, kio okazis kaj tio estis sperto, plurfoje ripetiĝis kaj ni vidis, ke ĝi pligrandiĝas, ni preferis silenti kaj ne krei plian malproksimiĝon. Eble tio estas pro nia historia malbonŝanco, kiam ajn ni volis komuniki kun sinjoro doktoro, ni ne povis kaj li ne permesis. Sed ni ne estas seniluziigitaj, estis temoj kiuj povas esti publikigitaj aŭ likitaj poste, sed ni ne notas ĉi tiujn aferojn. Ni kreis organizon en 1993, kiu estis renkontita kun forta opozicio de d-ro, kaj ĝi estis tre forta protesto kiun eĉ vi respektas en la dua nova eldono de la libro "la dua lingvo"! Kaj li havis malsaman vidpunktojn al movadumi kaj fondi asocion.

